Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj www.kava-pech.cz/iek
http://osiek.org

Internacia Esperanto-Konferenco 2012

kun pritraktota temo:
SCIENCFIKCIO KAJ ROBOTOJ

Svitavy (CZ), 2012-07-14/20

La konferencejo:

Ottendorfer-domo Svitavy, en kiu estas ankaŭ lokita Esperanto-muzeo



Loka organizanto:

Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy kune kun kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle KAVA-PECH, Anglická 878, CZ - 252 29 Dobřichovice
rete: www.kava-pech.cz/iek, chrdle@kava-pech.cz, tel.: +420.736645455

Partoprenkotizoj:

La Jara Kotizo (JK) al OSIEK estas egalvaloro de 25 poŝtmarkoj por enlanda letero. Por OSIEK-anoj la aliĝkotizo al IEK estas obligo de la JK, kun minimuma kaj maksimuma valoro.

Periodo	2012-01-31			2012-04-30			Pli poste		
OSIEK-membro	Min	Norm	Maks	Min	Norm	Maks	Min	Norm	Maks
	20 €	6*JK	60 €	25 €	7,5*JK	75 €	35 €	10*JK	100 €
Nemembro	80 €			100 €			120 €		
Part-tempa partopreno: po 24 € tage									

- Rabato 50%-a por junuloj ĝis 26 jaroj, handikapuloj
- Rabato 30%-a por samadresa kunulo de la aliĝinto

La kotizo inkluzivas: organizajn elspezojn, luon de salonoj, konferencajn materialojn, partoprenon en la programo, vizitojn en la urbo, interkonan vespermanĝon. Ĝi inkluzivas nek loĝadon, nek manĝojn **nek asekuron pri kiu ĉiu zorgu mem**. La kotizo estas nerepagebla.

Tranoktoj kaj manĝebloj:

Estas du kategorioj de tranokteblo: **En studenta hejmo** en du aŭ trilitaj ĉambroj kun necesejo kaj duŝejo ĉiam komuna por du ĉambroj, sen matenmanĝo, sed kun kuirejo en ĉiu etaĝo kaj proksima nutraĵvendejo. Da tiuj ĉambroj kun duŝejo kaj necesejo estas limigita nombro, post la elĉerpiĝo estos uzataj similaj, tamen kun komunaj necesejo kaj duŝejo trans la koridoro por kelkaj ĉambroj. **Atentu**, ke en la studenta hejmo ne estas mantukoj, do bv. kunporti proprajn .

En la tristela hotelo Garni, bone ekipita, kun matenmanĝo kaj senpaga enireblo en someran naĝejon kaj subtegmentan naĝbazenon 25m, kaj rabato 20% por ĉiuj servoj de boŭlocentro (boŭlo, skvaŝo, refreŝiĝo).

Prezoj de tranotoj po persone kaj nokte			
	Sola en ĉambro	En 2-lita ĉambro	En 3-lita ĉambro
Studenta hejmo	NE EBLAS	14	11
Hotelo Garni	35	25	

Rimarkoj: En la hotelo Garni ekzistas 4 pli luksaj ĉambroj, kiuj kostas po 62 €/ĉambro kaj unu luksa loĝapartamento kun kuirejo por 2 personoj (+ ĝis maks. 3 aldonaj litoj el faldeblaj brakseĝoj) po 90 €/apartamento, do tre konvena por familio kun infanoj.

Manĝoj: Estas sufiĉe da restoracioj en la proksimeco, tamen ni prizorgos komunajn manĝojn, se estos sufiĉe da interesatoj. Do kaze de via intereso pri la komunaj manĝoj bv. indiki tion en la aliĝilo kaj vi ricevos pli detalajn informojn.

Solidareca fonduso:
Estas bedaŭrinde, ke ekonomiaj cirkonstancoj tre malhelpas kelkajn samideanojn partopreni kaj kontribui al niaj konferencoj. Per via pago al „Solidareca fonduso“ ni povas malaltigi konferencajn kaj loĝejajn kotizojn al nivelo akceptebla por ili".

Kondiĉoj por pagoj kaj repagoj:

Tranoktojn vi povas pagi samtempe kun la kotizo (tiel vi ŝparos la ĝirokostojn kaj rezervokotizon) aŭ vi povas pagi nur la nerepageblan rezervokotizon 10 € kaj la reston de la kostoj pli poste, sed plej malfrue ĝis la 31-a de majo 2012.

Kaze de via neveno vi rericevos la pagon laŭ jenaj kondiĉoj:

Ĝis la 31-a de majo vi rericevos ĉion krom la partopren- kaj rezervo-kotizo. Se vi malaliĝos ĝis la 14-a de junio vi rericevos 90%, ĝis la 30-a de junio 60%, ĝis la 13-a de julio 40%, dum la unua konferenctago: nenion

Pagmanieroj:

Kotizoj povas iri rekte al la organizanto, sed ankaŭ eblos uzi peradon de OSIEK.

Kotizojn bv. pagi per unu el jenaj manieroj, kiujn bv. ne forgesi indiki en la aliĝilo:

- al la konto **kape-p** ĉe UEA
- al la konto **s-kape** ĉe SAT
- al la **konto ĉe Komerční banka Praha**:
  IBAN: CZ3301000000273484740227; BIC (SWIFT) KOMBCZPPXXX
  (aldonante 8 EUR por la bankelspezoj)
- **poŝtkonto de OSIEK-kasisto** Eric Laubacher no 1 399 87 R PARIS
  IBAN: FR47 2004 1000 0101 3998 7R02 028 BIC: PSSTFRPPPAR (ene de la EURo-zono devus esti senpage)
- FEL-konto de OSIEK: **osie-h**

Ĉe ĉiuj pagoj ne forgesu indiki la pagokialon: IEK 2012.

Kiel atingi la urbon Svitavy:
Svitavy estas malgranda urbo (20.000 enloĝantoj) en la distrikto Pardubice centre de Ĉeĥio, bone atingebla kaj peraŭte, kaj per publikaj trafikiloj. Ĝi situas sur la fervoja ĉeflinio inter la du plej grandaj urboj de Ĉeĥio, Prago kaj Brno. La plej proksimaj internaciaj flughavenoj estas Brno (+ 1 horo per trajno), Prago (+ malpli ol 2,5 horoj per trajno kaj Vieno (+ 3,5 horoj per trajno, kun 1 ŝanĝo).

Antaŭvidita programo:
Sabato: alventago, registriĝo, konatiĝo kun la Esperanto-muzeo, interkona vespero kun refreŝiĝo (manĝeto, tosto per vino)
Dimanĉo: atm. prelegoj de Libuše Dvořáková pri Svitavy kaj la regiono Pardubice kaj de Petro Chrdle: Robotoj kun la fono de la vio kaj verkaro de fratoj Čapek, **ptm.** gvidata promeno tra la urbo kaj la urba muzeo, **vesp.** Filmvespero
Lundo: atm. Du laŭtemaj prelegoj, **ptm.** Seminarioj je temoj: „Vikipedio kaj Esperanto“ kaj/aŭ „Objektiva informado pri Esperanto“, **vesp.** sporto: laŭinterese boŭlo, skvoŝo, tabloteniso
Mardo: atm. Du laŭtemaj prelegoj, **ptm.** Ekskurso al Litomiŝlo, meto de florbukedo al la tombo de Karolo Píč, **vesp.** Kultura programo
Merkredo: atm: du laŭtemaj prelegoj, **ptm:** piedekskurso al la fonto de la rivero Svitava (proks. 8 km), **vesp.** libera
Ĵaŭdo: atm. du laŭtemaj prelegoj, **ptm.** Trajnekskurso al Polička, **vesp.** internacia vespero (laux propono de la partoprenantoj.
Vendredo: atm. Ĝenerala asembleo de OSIEK kaj voĉdonado por la OSIEK-premio, oficiala fino de la konferenco.
Dum la kongreso estas planata ankaŭ paroliga kurso por komencintoj

* * * * *

Antaŭkonferenca turisma restado en Prago:

Ĝi okazos 2012-07-08/14 en Prago kaj ĝia pitoreska ĉirkaŭaĵo, sed eblos aliĝi ankaŭ por la duono, ekde la 11-a de julio. La partoprenontoj loĝos en tristela hotelo Krystal en Prago kaj krom ekskursoj en la fama historia mezepoka centro de Prago oni vizitos ankaŭ kelkajn eksterpragajn vidindaĵojn (Karlštejn, Sanklta Johano sub la Roko, kaj aliajn). La programo dependas de la nombro de aliĝintoj pro (mal)eblo lui aŭtobuson aŭ neceso uzi trajnon kaj simile.

Turisma plilongigo en Svitavy-regiono:

Svitavy-regiono havas multajn belejn vidindaĵojn. Kelkajn ni vizitos dum la konferenco (certe Litomyšl, protektita kiel kultura heredaĵo de Unesko, en Esperantujo konata pro la romano *La Litomiŝla tombejo* de Karolo Píč), sed por povi pli ĝui la regionon kun gvidado en Esperanto eblas resti ĝis dimanĉo en la hotelo Garni. Por la aldona programo ne estos aparta kotizo, ĉiu pagos mem siajn elspezojn.

* * * * *

Okaze de la konferenco kun la temo pri sciencfikcio kaj robotoj la eldonejo KAVA-PECH preparas eldonon de la dramo de Karel Čapek „R.U.R.“, en kiu unuan fojon estis uzita la termino „robot“ por artefarita homsimila inteligenta estaĵo. La vorto sekve disvastiĝis en preskaŭ ĉiuj lingvoj de la mondo kaj fariĝis norma teknika termino. Tiu famkonata sciencfikcia dramo estas envicigita en la serion Oriento-Okcidento de UEA. Ĝi estos je dispono dum la konferenco.

112 paĝoj, solide bindita**,** Ilustraĵoj: Miroslava Tomečková

ALIĜILO

al Internacia Esperanto-Konferenco 2012

Svitavy (CZ), 2012-07-14/20

S-rino ☐ F-ino ☐ S-ro ☐ Vegetaran(in)o ☐

Familia nomo: ……...… Persona(j) nomo(j): ……...……..……..…

Plena poŝta adreso: ……

……

Telefono: …… E-poŝto: ……@…….……

Mi rezervas tranoktojn por la noktoj:

- de …… ĝis ……, entute …… noktojn
- prefere en …… lita ĉambro kun .....

☐ en studenta hejmo

☐ en la hotelo Garni

Mi pagas per jena maniero …….....

Mi petas oficialan invitleteron al la konferenco	jes / ne
Mi interesiĝas pri komunaj tag- kaj vespermanĝoj	jes / ne
Mi interesiĝas pri antaŭkonferenca aranĝo en Prago	jes / ne
Mi interesiĝas pri la postkonferenca turisma restado en Svitavy	jes / ne

Atentu, ke la aliĝilo estas valida nur post la pago de la konferenca kotizo.

Baldaŭ eblos aliĝi ankaŭ rekte ĉe la paĝaro www.kava-pech.cz/iek

Sciigo por la organizantoj:

Dato: …… Subskribo: ……

Vian aliĝilon sendu al la adreso info@kava-pech.cz
aŭ: KAVA-PECH, Petr Chrdle, Anglická 878, CZ - 252 29 DOBŘICHOVICE